

JAUME GRAU CASAS

AMAJ POEMOJ



BARCELONA

1924

821.922-1 : 821.134.1-1

AL MIA AMATINO
FRAULINO LOLA GRAU CASAS

709 906



REMEMORO

En tago printempa de hela ĉielo,
de ĝojoj vivigaj parfuma maten',
aperis ĉe mia vojiro sen celo
brilanta ruben'.

Belega knabino per ruĝaj koloroj
vestita ĝi estis; ne — gema trezor'.
Vivanta rubeno de miaj fervoroj:
por vi, mia kor'!

Logita de ŝia parfumo, mi restis,
je hela dianto de ruĝa kolor',
kaj poste, pro l' vento velkinta, ne estis
por mi tia flor'.

Kaj koro la mia kvieta ne povas
restadi kaj flirtas tra ĉiu ĝarden',
sed floron similan neniam ĝi trovas
por mia ĉagren'!

BELULINO ILUZIO

De trapasanta belulin'
en mia kor' la bildo restis.
Ŝi dum momento ravis min
kaj ho malĝoj'! tuj reforestis.

Sed dum moment' en mia kor'
naskiĝis ĝojo kaj admiro.
Pri ŝi vivadas rememor'!
Pro ŝi turmentas min sopiro!

Dolĉa rigardo ravis min,
gracia gesto,
kaj pli ol tiu de reĝin'
hela majesto.

Ŝiaj okuloj — fajra ard' —
malgraŭ nigrec' montriĝis lumaj.
Ŝia vizaĝ', ŝia rigard',
je am-odor' estis parfumaj.

Ŝi pasis for kvazaŭ vizi'
ekforprenante mian volon.
Pro mia ĵusa ampasi'
mi falis tuj en senkonsolon!

Dolĉa rigardo ravis min,
gracia gesto,
kaj pli ol tiu de reĝin'
hela majesto.

Belmova paŝ' — milda promen' —
donis al ŝi palman gracion,
noblecon havis la mien',
la tuta korpo harmonion.

Ŝia belec' en malproksim'
iom post iom malaperis,
kaj mia korpo kaj anim'
pro amaj vundoj eksuferis.

Dolĉa rigardo ravis min,
gracia gesto,
kaj pli ol tiu de reĝin'
hela majesto.

Radia ĉarmo kaj majest'
estis por mi feliĉ-promeso,
kaj la graci' de ŝia gest'
ŝajnis al mi milda kareso.

Sed ve! la kara belulin'
restis por ĉiam — fantazio!
La cel' de mia korinklin'
konstante estis — l'Iluzio!

Dolĉa rigardo ravis min,
gracia gesto,
kaj pli ol tiu de reĝin'
hela majesto.

En persekut' de l'Iluzi'
mia junec' kaj viv' elfluis,
kaj de l' nektar' de l' Ampasi'
eĉ unu guton mi ne ĝuis.

Do ĉar la revo iĝis jam
mia dolor' kaj mia forto,
ke l' Iluzio pri la Am'
min akompanu ĝis la Morto!

Dolĉa rigardo ravis min,
gracia gesto,
kaj pli ol tiu de reĝin'
hela majesto!

MINIATURO

Bela knabineto
freŝa kiel roz',
viva malkviato,
movo sen ripoz',

gaja lumradio
de blua ĉiel',
blanka papilio,
helvida juvel',

klara melodio
de dolĉa kanzon',
ama idilio
en flora burĝon',

trunko de lilio
de milda parfum',
bela je linio
koloro kaj lum',

siluet' gracia
de printempa flor',
heleco radia,
ravanta trezor',

ĝojo delikata
ĉarmo de la viv',
revo karesata,
alloga naiv',

ora filigrano,
tril' de najtingal',
bruo de infano,
ĉiel', ideal':

feliĉo vi estus
por maljuna kor'
se ĉiam ĝi restus
apud via glor':

mia kor', vundita
kun vundo de Am',
ĉiam konsumita
de turmenta flam',

mia kor', maljuna
de tioma sent',
de vivo sensuna
kaj aŭtuna vent'.

AMA MALKVIETO

Nedifinebla malkviet'
loĝas en mi ĉiun momenton;
neeble — scii pri l' sekret'
esprimi klare mian senton.

Kiam aspektas ĝi dolor',
invadas min melankolio;
kiam ĝi estas ĝoja glor',
ĉirkaŭ mi flosas poezio.

Tiela estas ĝia ĉarm'
kiel sonor' de bela kanto,
kiel amika, frata varm',
kiel parfumo de dianto.

Pro ĝia fido kaj esper'
mia rigard' estas serena,
miaj malsanoj — sen sufer'
kaj mia vivo — pacoplana.

Kaj tiu sent' revigas min
pri fantaziaj ampromesoj
kvazaŭ prononcus amatin'
vortojn por mi kiel karesoj.

Tiam min gvidas tra la voj',
de belulino la rigardo;
kaj estas Amo mia ĝoj',
de mia viv' hela standardo!

DE L' POETO AL AMATINO

Kredu min, amatin' ĉarma,
kaj forigu viajn timojn;
miajn sincerajn esprimojn
tute fidu via kor';
kvankam forte min altiras
de Natur' la Poezio,
de mia ama pasio
por vi estas la fervor'.

Ne bedaŭru mian amon
je l' Naturaj emocioj,
ĉar, kvazaŭ viaj gracioj,
vekas sentojn de l' Poet';
kaj li glorajn similecojn
en vi trovas, kun plezuro,
je la ĉarmoj de Naturo,
de viaj ĉarmoj portret'.

Estas via ruĝa buŝo,
por mi, kvazaŭ bela floro
heliĝinta, dum aŭroro,
pro la kiso de la sun';
kaj estas viaj okuloj
tiel helaj kiel lago
montranta, post luma tago,
bluajn rebrilojn de lun'.

La bruo de l' foliaro,
pro la venteta kareso,
ŝajnas diri pri amjeso
mallaŭta, kun ĉarma tim';
kaj mi tiam rememoras
la dolĉajn, gajajn momentojn,
dum ni esprimas la sentojn
de nia amo sen lim'.

Kiam, ĉe fino de tago
ĉielblua, dum somero,
min ĉirkaŭas la mistero
de la glora sunsubir',
mi kredas ke min influas
via rigardo magia,
kies ĝoj' melankolia
min pretigas al sopir'.

La triloj de la birdaro,
kiu ĝojege sin movas
sur la branĉoj, ĉar ĝi trovas
en ili lokon por nest',
estas similaj al viaj
ĝojaj, belsonaj ekkrioj,
kiam miaj ampasioj
elmontriĝas sen atest'.

Kaj en tiaj emocioj
trovas anim' de Poeto
dolĉan fonton de kvieto,
dum je vi li restas for;
ĉio kio lin kortuŝas
kaj antaŭ li belaspektas,

pri viaj ĉarmoj nur estas
ĝojiganta rememor'.

Amu min, amatin' ĉarma,
kaj la varm' de miaj rimoj
estu por niaj animoj
ama kuniga fervor';
nur apud vi mi deziras
vin rigardi kun envio,
ĉar mia ama pasio
estas mia sola glor'.

MADRIGALO

Dolĉa knabino mia,
je karesaj rigardoj malavara:
se via frunto klara
kaj figur' harmonia,
se viaj ĉarmoj kaj belec' magia
ne igus vian amon senkompara,
certe ĝi estus tia
kiam via rigard', tiel bonfara,
pro nia am' pasia,
kun tia brilo ardas al mi kara!

DUBO

Fraŭlino rava kaj bela,
kiel lilio gracia:
la ĉarma rideto via
kaj via rigardo hela,

via harar' bonodora,
kiun mi ŝatas karesi
dum mi vin aŭdas promesi
pri amo vera, fervora,

tiel forte min impresas,
ke mi ja neniam scias,
kio pli aminda estas:

haroj, kiujn mi karesas,
lipoj, kiujn mi envias,
okuloj, kiujn mi festas...

KANTO DE L' TROBADOR'

Kantu nun trobador'! Eksonoru la lir'!
Rakontadu l' inspir' pri la sentoj de l' kor'.
Delikata sopir' kun pasia fervor'
dolĉe diru pri l' glor' de la Ama dezir'.
Ho dezir' de la kor'! Ho sonor' de la lir'!
Kantu nun trobador' kun fervor' kaj inspir'.

Se kun dolĉa plezur' nutras Amon esper',
de la lir' tra l' aer' vibras klara murmur'.
Estas milda sufer' kaj turmenta plezur'
kateniĝi ĉe l' mur' de la Ama karcer'.
Ĝi kiel paca terur' estas ĝoja sufer',
sen liber', kun plezur', ĉe la mur' de karcer'!

Se ne lumas esper' pri la Amo-trezor'
ne plu vibras sonor' de la lir' tra l'aer',
ĉio estas dolor', ĉio estas sufer',
kaj fariĝas karcer' tuta ter' por la kor'.
Eĉ ne estas liber' en libera lazur',
kun la kor' sen esper' kaj sen Ama plezur'!

Eksonoru la lir' kun inspir', trobador',
kaj pri sentoj de l' kor' rakontadu l' inspir'!
Delikata sopir' kun pasia fervor'
dolĉe diras pri l' glor' de la Ama dezir'.
Ho sonor' de la lir'! Ho dezir' de la kor'!
Kun fervor' kaj inspir' kantu nun, trobador'!



SERENADO

Se la beleco de kanzon'
kortuŝus vin, kara knabino,
tiam el mia mandolino
ekvibrus tuj dolĉega ton'.
Sonus klara, pura son'
aŭ vibrus nur mallaŭta ĝemo,
sed estus dolĉa ja la tremo
de l' mandolin' dum la kanzon'.

Per la beleco de kanzon'
allogus mi vian animon;
al mia sent' taŭgan esprimon
donus la kant' sub la balkon'.
Miaj paroloj, kora don',
estus pri am' preĝ' elokventa;
kaj eĉ petanta voĉ' silenta
estus la paŭzoj de l' kanzon'.

Per la sopiroj de l' kanzon'
konsolus sin la koro mia
se iam via rigard' pia
mankus al mi por mia bon'.
Ĉar por amant' estas bezon'
sian amsenton ĉiam ĝui
aŭ la ĉagrenon sian skui
per la dolĉeco de kanzon'.

Se al vi plaĉus la kanzon'
kiu rakontas mian senton,
forigu tuj mian turmenton:
por miaj penoj estu kron'.
Kaj estos via amo spron'
por mia kanto ĝojoplena,
kaj mia viv' fluos serena,
kun feliĉeco de kanzon'.

SONETO

Al la Reĝino de niaj Floraj Ludoj

Kia ĝojo por mi, kia honoro,
se mi povus per voĉo melodia
kanti la ĉarmon de l' Reĝino nia,
de nia festo poezia gloro!

Kia ĝojo por mi, se pro l' fervoro
kaj naiveco de la kanto mia,
memoro restus pri l' Reĝin' gracia
por ĉiam en la fund' de ĉiu koro!

Kia ĝojo por mi, se harmonia
la mia kant', en tiu bela horo,
aŭdigus sin kun ritmo kaj sonoro,
kiel plektita de inspiro dia!

Mi ĝin oferus al beleco Ŝia,
kvazaŭ ĝi estus la Natura Floro.

Premiita per la Natura Floro en la VII^a Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj

AL AMIKO

Sub freŝa ombro de maljuna arbo,
sidante tere sur l' abunda herbo,
mi volus tie apud mi vin vidi,
amiko mia.

Mizerojn mondajn forgesante tie,
kiuj lacigas kaj tro frue lasas
la kapon blanka, pri l' nuntempo gaja
ni nur parolus;

pri, ĉu la nuboj super mont' starantaj
kaj trairantaj en ĉielo blua,
alportas pluvon al la ter' amika
aŭ sole varmon;

pri la trunkaroj de vinberoj nigraj
kiujn rigardas kamparan', pensante
pri kiam ilin la piedoj premos
purpurigintaj;

pri hund' fidela, apud ni kuŝanta,
pri l' vent' movanta kanojn malkvietajn...
Jen poste veni tra vojet' ni vidus
knabinon belan,

kun kruĉo plena de kristala akvo;
kaj, je la peto por ĝin trinki nia,
ŝi, ruĝoplenaj la grasetaj vangoj,
«Ektrinku» dirus.

JOAN MARAGALL

L' ANIMO DE L' FLOROJ

Ĉi-tiuj belaj floroj forlasitaj
sur lok' de trairad',
de kiu tien estas forĵetitaj?
De iu, kiu ajn.

Ne estas ja malĝojaj tiuj floroj
ridante sub la sun'.
Mi sentis min ravita vidi ilin
sen ia timo pretajn morti tuj.

«Ni certe mortos tuj, for de la trunko»,
— de l' floroj jen la pens'; —
«sed nune nia bril' ravas Poeton:
jen bela senmortec'».

JOAN MARAGALL

VOJIRANTE TRA LA MONTARO

Plaĉas al mi, bastono ĉe la man',
sur horizontojn ĵeti la rigardon,
en mi senti senlimon de l' ĉiel'
kaj la grandan kvieton de l' montaroj,
la riverbruon aŭdi tra la val'
kaj malproksiman eĥon de l' tondrado;
ĉe la supro de l' mont' vidi senmovan
alian eĉ pli altan nubmontaron,
kotonan, kun ruĝhel' ĉe Okcident'.

Kaj vidi, post la sunestingiĝado,
senkoloriĝi teron antaŭ mi,
senkoloriĝi la ĉielarkaĵon...
La unuajn malĝojojn de la nokt'
en miaj ostoj senti tiam plaĉas;
kaj venante malsupren el montpint'
transiri la mallumon leviĝantan.

JOAN MARAGALL

LA TROBADORO KAJ LA PRINCINO PIRENEAJ

Se infanoj estus ni,
ni farus edziĝ-ludadon:
mi — la reĝo tie ĉi,
vi — reĝin' ĉe via flanko.
Nu, mi irus serĉi vin,
grandegan regnon ni havus;
la regno de l' Pirene'
kronita de neg' tre blanka,
verdebenoj ĉirkaŭ ĝi
kaj blua mar' ambaŭflanke.
Paŝtistojn reĝadus ni,
maristojn kaj kamparanojn;
reĝo, kortego, popol' —
kune ĉirkaŭ viaj ĉarmoj.
Kaj prezentiĝus ĉe vi
ĉiu kun la propra tasko:
paŝtistoj kun la brutar'
forlasante la montarojn;
kun remiloj la marist'
kaj odor' je mara akvo;
kun bovoj la kamparan',
el plugilo resonanta;

ĉiuj kun soif' je am':
 kaj ni ambaŭ estus l' akvo.
 La noblan arton de l' kant'
 en vortoj bone rimataj
 al fraŭloj lernigus mi,
 vi al fraŭlinoj la dancon,
 kaj reirus al la hejm'
 ĉiuj kun vizaĝ' ridanta;
 la maristoj al la mar',
 la paŝtistoj al montaroj,
 la plugistoj al la kamp'...
 kaj unu alian ni ambaŭ.
 Kaj regno de l' Pirene'
 estus la regno plej paca.

JOAN MARAGALL

LA BUKEDO DE SANKTA JOHANO

(Tradicio, el la poemo «Canigó»)

La tag' de Sankta Johan'
 estas festotago ĝoja;
 knabinoj el Pirene'
 metas bukedon sur pordon,
 rememore pri knabin'
 okulblua, brovoblonda,
 havanta stelon sur frunt'
 kaj sur ĉiu vango rozon.
 Junul' enamigis ŝin,
 sed ve! li ne estis bona,
 similis al raba bird',
 kiu flirtadas kolombon.
 En tag' de Sankta Johan'
 la knabin' iris al bordo
 de bela, klara river',
 por kolekti kelkajn florojn.
 Florojn de hela kolor'
 abunde ĉie ŝi trovas,
 floretojn de timian'
 kaj rosmaren' bonodorajn,
 kaj per krucforma buked'
 la hejman pordon ŝi kronas.

Kiam alvenas l' amant'
 li haltas antaŭ la pordo;
 — Kial — ŝi diras al li —
 vi restas ekster la domo?
 — Ĉar baras l' eniron vi
 per ĉi-tiuj viaj floroj.
 — Ĉu vin timigas buked'?
 — Timigas min ĝia formo.
 — Estas ĝia formo kruc';
 vi ne estas io bona.
 — Nu, la malbona spirit'
 kiu l' animojn forportas.
 Se ne estus la buked',
 la vian baldaŭ mi trovus
 kaj vi kuŝadus kun mi
 en mia fajra kuŝloko. —

Ĉar okazis tio ĉi
 apud rivero Garona,
 dum tag' de Sankta Johan',
 tra l' tuta montregiono,
 knabinoj el Pirene'
 metas bukedon ĉe l' pordo.

JACINTO VERDAGUER

LA MISTERO DE L' HERBEJO

Apude de l' river' floras trankvila
 la junfreŝa herbej', velursimila...

Tagmeze mi ĝin vidis
 brulantan de lumhel', — blindiga brulo —
 kaj ankaŭ nokte, kiam sur ĝi sidis
 anstataŭ luma ĝoj' densa nebulo.

Herbej' misteron havas;
 nur l' akvo konas ĝin, en ĝi kantanta;
 kial ĝia florar' tiele ravas
 ĉiun, kiu ĝin estas rigardanta?

Eĉ la nimf' de l' rivero, kuŝigante
 sur ĝi sian nudecon,
 harligojn malplektante,
 de ĝi petas imiti la belecon.

Sed silenta, trankvila,
 dormiĝas freŝa herb', velursimila...

JOAN MARIA GUASCH

Premio de versa traduko en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

BENO DE LA MANĜOTABLO

Benu la manĝotablon, ho Sinjor',
provizitan de ni kun helpo via,
kaj kiel nevidebla kunmanĝant',
restu ĉe nia rondo familia;
ĉar tiujn dolĉajn fruktojn ŝuldas ni
al viaj kampoj sub lazur' ĉiela,
kies vasteco igas antaŭ si
nian figuron eta kaj malhela.

Se l' panon igis karn' kaj vinon sang',
Vi igu amo ĉiujn niajn vortojn,
kaj al ni donu ĉiam, ie ajn,
vian gvidon sur voj' kaj viajn fortojn;
ĉar atingi nur estas nia cel',
post ĉia provo kaj klopod' senpova,
nin vidi kunigitajn kiel nun,
en via Pac' eterna, ĉiam nova.

RAMON SURINYACH SENTIES

HISPANA MADRIGALO

AL FONTO

Se al la fluo klara
de viaj ondoj brilaj,
okulojn turnus per rigardo ama
mia neamantino,
ŝian bildon en l' ondoj rebrilantan
kisadus miaj lipoj;
kaj vin elsekigadus
ilia ardo de brulantaj ŝtipoj.
¡Fonto gaja kaj klara!
Viaj ondoj evitu ploron mian;
se miaj fajraj lipoj vin kisadus,
ili pli soifadus,
ĉar bruligus la kis' kristalon vian...

RICARDO LEÓN



ENHAVO

AMAJ POEMOJ

	<u>Paĝoj</u>
Rememoro.	3
Belulino Iluzio	4
Miniaturo	7
Ama malkvieto	9
De l' Poeto al Amatino	11
Madrigalo	14
Dubo.	15
Kanto de l' Trobador'.	16
Serenado	18
Soneto: Al la Reĝino de niaj Floraj Ludoj.	20

TRADUKOJ

Al amiko	21
L'animo de l' floroj.	23
Vojirante tra la montaro.	24
La trobadoro kaj la princino Pireneaj	25
La Bukedo de Sankta Johano.	27
La mistero de l' herbejo	29
Beno de la manĝotablo	30
Al fonto.	31



Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000988021